

Naskiĝo de la svisa federacio, rezistoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 586, 1991.01.31 & 02.03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Tiun ĉi jaron, kiel vi scias, la svisoj festas la sep-centan jubileon de la pakto de 1291, kiu ligis la tri kantonojn Uri, Schwytz kaj Unterwalden en defenda konfederacio. Tiu konfederacio de tri ŝtatoj iom post iom kreskis al ligo de 8 ŝtatoj, poste de 13 kaj fine de 22 ŝtatoj, kiel nun kreskas la Eŭropa Komunumo. Nur en 1848 ĝi fine fariĝis reala federacio kun la latina nomo **Confoederatio Helvetica**. De 1291 ĝis 1848 la svisoj bezonis pli ol kvin jarcentojn por ekkonscii pri sia sviseco kaj organiziĝi laŭ federaciaj principoj. E1 tiu fakto multaj politikistoj opinias, ke estas vane paroli pri federiĝo de la ŝtatoj de Eŭropo aŭ de la Mondo, ĉar se la Eŭropa Federacio aŭ la Monda Federacio sin trudos laŭ la ritmo, kiu estis necesa al la formiĝo de Svislando, tiam tiuj federacioj reale ekvivis nur en la dudekkvina jarcento. Tiu komparo komprenigas, kiom malrapide evoluis la ŝtataro svisa de simpla ligo ĉefe defenda, al federacio iom efika.

A.- Pli atenta rigardo al la svisa historio tamen pruvas ion alian, ol la malrapidan evoluon de la politikaj ideoj. Pli ol kvin jarcentoj estis necesaj al la svisaj ŝtatoj kaj al ties civitanoj por eksperimenti la malagrablajn de tre kompleksa sistemo de aliancoj inter absolute suverenaj ŝtatoj. Kaj subite, pro decidiga krizo, pro la interkantona milito nomata Sonderbund, oni vigle sentis la mankon de superŝtata aŭtoritato. Tiam nur naŭ monatoj estis necesaj por starigi la nunan federacion.

Cl.- Atenta studanto de la svisa historio ankaŭ malkovras, ke la nocio mem de federismo ne naskiĝis en la tempo de Wilhelm TELL, kiel la svisa folklorismo ŝatas aserti. Tiu nocio estas prunto el Ameriko. Se la nordamerikanoj ne estus redaktintaj en 1787 la Usonan Konstitucion, kiu klopodis kunvivi du kontraŭajn tendencojn: centralismon kaj emon al aŭtonomeco, tiam la svisoj verŝajne ne estus kreintaj sian federacion en 1848.

A.- Ĝis la krizo de 1847 estis kvazaŭ tabuo paroli pri tutsvisa registaro. La defendantoj de la ideo mem pri federiĝo de la svisaj kantoj estis konsiderataj kiel malbonaj patriotoj.

Cl.- En la Ĝeneva Parlamento la naturalisto Augustin-Pyrame DE CANDOLLE esprimis la vidpunkton de la tiamaj patriotoj. Estis en 1832, nur 16 jarojn antaŭ la fondo de la Svisa Federacio. Ni citu liajn vortojn:

A.- "Kion deziras la proponantoj de nova pakto? Ili deziras tion, kion ni ne povas akcepti, nome federacian respublikon, anstataŭ kunveno de suverenaj ŝtatoj... Kun geografia situacio, moroj, tradicioj, lingvo, kiuj nin diferencigas de la aliaj ŝtatoj, ni ne povas deziri sistemon, kiu nin devigus pli malpli oferi nian propran naciecon."

Cl.- Ĉu ne strange, kiel samaj historiaj procezoj ripetiĝas. Sama estis la kontraŭstaro al la proponantoj de Monda Federacio, kiam estis fonditaj ĉu Ligo de Nacioj post la unua mondmilito, ĉu Unuiĝinta Naciaro post la dua. En 1918 kaj en 1945 la ŝtatoj ne pretis oferi parton de sia suvereneco profite al federacia organizo pacorganiza. En sama spirita stato vivis la svisoj antaŭ 1848. Ni revenu al la antaŭfederacia Svislando. Dum la sama parlamenta diskuto alia ĝenevano nomata LAFONTAINE asertis "utopia" la proponon fondi tutsvisan unuiĝon. En sia libro **Federala Sperto** Edmond PRIVAT citas unu el liaj dirojn. Aŭdu ĝian aktualecon:

A.- "Ĉiu kantono tro ŝatas sian suverenecon kaj rigardas ĝin kiel tro karan trezoron por deziri reĝimon, kiu ĝin grave malfortigus."

Cl.- Pro tiu politika blindeco 15 jarojn poste Svislando travivis interkantonan militon. Por ŝanĝi la pensmanieron de la svisoj estis necesa la traŭmo kaŭzata de tiu milito nomata **Sonderbund** (germana nomo, kiu signifas aparta ligo). La nova generacio tiam komprenis, ke la politika realeco ne plu apartenas al Ligo de suverenaj ŝtatoj sen superŝtata registaro, sed al federacio de 22 kantonoj kun superkantona registaro. Tre rapide naskiĝis nova civitaneco tutsvisa, kiu adiciiĝis al la kantonaj civitanecoj. William RAPPART, la historiisto de la svisa federismo, skribas tion ĉi pri tiu metamorfozo:

A.- "La svisa publika spirito, kies proverba mallarĝeco spegulas samtempe la topografion kaj historion de eta lando, sin ĉiam ribelis kontraŭ la postuloj de komuna vivo. Kiam la politikaj kaj ekonomiaj interesoj de la kantonoj incitis ilian alproksimiĝon aŭ eĉ ilian kunfandiĝon, la preferoj de iliaj loĝantoj ne ĉesis postuladi daŭran propran sendependecon. La federacia ŝtato aperis kiel kompromiso inter tiuj interesoj kaj preferoj."

Cl.- Kiel en Usono la federiĝo kunvivigas du kontraŭajn tendencojn: centrismon kaj emon al aŭtonomeco. La svisaj kantonoj akceptis federiĝi, tio signifas oferi parton de sia suvereneco al superkantona aŭtoritato, nur kiam la svisoj konstatis, ke kunvivado de 25 sendependaj suverenecoj fariĝas netolerebla kaj kondukas al katastrofoj. La mondo estas nun en analoga situacio, kiu malebligas la solvodon de la interŝtataj konfliktoj. Tial ili jaron post jaro pligraviĝas.

A.- Sed antaŭ ol akcepti tiun federiĝon, la kantonoj, nekapablaj akordiĝi pri komuna svisa politiko, faris al si reciproke teruran ekonomian militon. En 1847 oni kalkulis en Svislando mem proksimume 400 dogan-baraĵojn, kie taksigis la interkantona trafiko, tio signifas 70 pli ol en la komenco de la jarcento. Dogano ekzistis ĉie, escepte sur la komunaj eksteraj limoj. Sur la San-Gotarda vojo la kantono Tiĉino taksadis la vartrafikon en dektri lokoj. Ofte estis devige malŝarĝi la varojn por ilin pesi. Pro tio la internacia komerco evitis Svislandon. Kaj la svisoj mem ne povis uzi la proprajn vojojn. La industriistoj de Sankt-Gallen sendis siajn varojn al Genevo tra Besançon en Francio kaj al Italio tra la pasejo Brenner en Aŭstrio.

Cl.- Ĉiu kantono volis trudi sian volon al la ceteraj. Estas la politiko pri potenco. Aŭtomate formiĝis koalicioj por rezisti al premadoj. Pro manko de centra aŭtoritato la konfliktoj neniam povis solviĝi. Kontraŭe jaron post jaro ili akriĝis. Nur la armiloj fine povis decidi. Tre similan situacion ni konas en la hodiaŭa mondo. Unuiĝinta Naciaro grupigas ŝtatojn, kiuj rifuzis cedi parton de sia suvereneco. Ne ekzistas reala superŝtata povo kun obeiga polica forto.

A.- De 1291 ĝis 1848 Svislando travivis multajn interkantonajn konfliktojn kaj eĉ militojn. Hodiaŭ la historiaj lernolibroj nomas ilin civilaj militoj, sed fakte ili estis internaciaj, ĉar ĉiu kantono estis vera nacio. Hodiaŭ la svisaj infanoj tion malfacile komprenas.

Cl.- Kion la ĝeneva parlamentano LAFONTAINE nomis utopio, tio fariĝis tre rapide ĉiutaga realaĵo en la koroj kaj spiritoj de la loĝantaro de nova nacio. Almenaŭ en Eŭropo ni ekvivis saman metamorfozon. Kvankam Svislando ne estas membro de la Eŭropa Merkato, eĉ la svisa junularo pensas pli vastskale, ol la limigita sviseco. Eŭropo fariĝis por ili realaĵo, kiun la sukceso de la Eŭropa Komunumo brusela kaj de la Eŭropa Kortumo strasburga konkretigas pli kaj pli. En la cerboj de la hodiaŭa junularo la politika nocio de Eŭropo estas verŝajne pli konkreta, ol la konscio pri Svislando en la cerboj de la svisa junularo antaŭ la fondo de la Konfederacio Helveta en 1848. Pri tio ni parolos en la venontaj semajnoj, provante kompari la

tiaman situacion svisan al la hodiaŭaj eventoj eŭropaj aŭ mondaj. Historiaj raportoj fariĝas interesaj, kiam ili aktualigas nunajojn samtipajn.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND pretas sendi la tekston de sia prelegaro pri la formiĝo de la svisa federacio al la geaŭdantoj, kiuj petos ĝin skribi. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*